

DUMONATA REVUO / TWEEMAANDELIJKS TIJDSCHRIFT

Sonorilo

66-A JARO, N-RO 6
NOVEMBRO-DECEMBRO 1974
BELGA ESPERANTO-FEDERACIO

LA LASTA ...

Sonorilo

Oficiala organo de Belga Esperanto-Federacio, St.-Bernardsesteenweg 1078, 2710 Hoboken.
Poŝtĉekkonto de BEF: 000-0163434-86 de BEF, Oude Donkiaan 83, 2100 Deurne.

Prezidanto: D-ro Pol Denoël, Rue Victor Raskin 20, 4000 Liège.

Redakcio: Drakenhoflaan 97, 2100 Deurne.

Ĉefredaktoro: Fernand Roose.

Redakcia sekretario: Paul Peeraerts.

Ĉina Esperanta monata gazeto

EL POPOLA ĈINIO

Varbas abonantojn de 1975

Abonprezo:

1 jaro 90 b.fr.
2 jaroj 135 b.fr.
3 jaroj 180 b.fr.

Abonu ĉe:

Eldonejo-Librejo "Sonorilo"
St.-Pieterskerklaan 61
8000 BRUGGE
(pĉk. 000-0152140-44)

aŭ rekte ĉe la Esperanto-

sekcio de GUOZI SHUDIAN, P.O.Kesto 313, Pekino, Ĉinio.

Abonigu ankaŭ viajn geamikojn - Senpagaj numeroj akireblaj

movado

Dum la administrantara kunsido de BEF

GRAVA DECIDO :

LA REVUO „ESPERANTO“ ANSTATAŬOS „SONORILO“

La 9-an de novembro laste, la administrantaro de BEF faris gravan decidon kiu tre verŝajne altgrade influos la estontecon de la federacio: ekde januaro 1975 la revuo "Sonorilo" ne plu aperos; anstataŭe ĉiuj membroj (ekde la 16-a jaro) ricevos senpage la kvalitan monatan revuon "Esperanto", la eldonon de Universala Esperanto-Asocio.

La revuo kiun vi nun tenas en viaj manoj estas do la lasta „Sonorilo“ kiu aperas. Aŭ almenaŭ, ĉi provizore estas la lasta kiu aperas. Ĉar efektive tiu decido estis ege grava kaj konos ĝis nun ne konatan multifacetan sekvaron, BEF decidis konsideri tiun paŝon kiel unujaran provon. Se do je la fino de la venonta jaro montriĝas, ke la nova direkto ne estas kontentiga, tiam „Sonorilo“ denove kiel Fenikso el siaj cin droj reaperos.

Sed kio por la personoj kiuj estas individuaj membroj de UEA ? Ĉu ili do ricevos la revuon en du ekzempleroj, unu de BEF kaj unu de UEA ? Kompreneble ne. Tiuj kiuj estas individuaj membroj de UEA, aŭ pli precize "Membroj Abonantoj", ricevos la revuon nur rekte de UEA. Al BEF tamen ili pagu nur rabatitan kotizon je 20 %. Alivorte, membroj de BEF kiuj estas dum la sama jaro Membro Abonanto de UEA, ricevas rabaton de 20 % je la kompleta sumo. Tio estas 200 fr. anstataŭ 250 por la ordinara (= plenkreskaj) kaj 100 anstataŭ 125 por la junulaj mem-

broj. Ili ricevos la revuon Esperanto kaj ĉu Esperanto Panorama, ĉu l'Esperanto en Marche.

Plejeble superrigardebla kotizotabelo por BEF kaj UEA ni publikigas sur la venonta paĝo. Ĉiujn ni volus speciale peti seeble en 1974 ankoraŭ pagi sian kotizon ! Avantaĝoj estas pluraj. Unuflanke vi faciligas al ni la administran laboron; aliflanke vi estos certa tuj ekde januaro ricevi jam la novan revuon. Al tiuj kiuj pagos ekzemple nur en aprilo, ni ne povos garantii ke tiam ankoraŭ haveblas la tri unuaj aperintaj numeroj. Do ek al via monujo !

Ω
Ω En tiu ĉi lasta numero de Ω
Ω „Sonorilo“, ni volas en la Ω
Ω nomo de ĉiuj administrantoj Ω
Ω kaj membroj de BEF tute Ω
Ω danki s-ron F. Roose, la Ω
Ω ĉefredaktoron, pro lia mult- Ω
Ω jara nelacigebla laboro por Ω
Ω la bono de la revuo, de la Ω
Ω federacio, kaj de la movado ! Ω
Ω

KOTIZOJ BEF KAJ UEA POR LA JARO 1975

KATEGORIOJ DE BEF-MEMBROJ	KOTIZO
BM BONFARANTA MEMBRO (1)	400
M MEMBRO (1)	250
M-SR MEMBRO SEN REVUO (2)	200
JM JUNULA MEMBRO (3)	125
JM-SR JUNULA MEMBRO SEN REVUO (4)	100
KM KADETA MEMBRO (5)	50
FM FAMILIA MEMBRO (enloĝanta)	75
A ABONO AL LA REVUO SEN MEMBRECO	250

Se oni volas ankaŭ esti individua membro de Universala Esperanto-Asocio, oni krome pagu la ĉi-subajn kotizojn :

KATEGORIOJ DE UEA-MEMBROJ	KOTIZO
MA MEMBRO-ABONANTO (6)	720
MJ MEMBRO KUN JARLIBRO	360
MS MEMBRO SUBTENANTO (6)	2160
DM DUMVIVA MEMBRO (7)	14400
JMA JUNULA MEMBRO ABONANTO (8)	540
JMJ JUNULA MEMBRO KUN JARLIBRO (9)	180

La kotizoj povas esti pagataj al via loka Esperanto-grupo, aŭ, se vi ne apartenas al grupo, rekte al BEF, Oude Donklaan 83, 2100 Deurne - pĉk. 000-0163434-86.

Notoj

- (1) M kaj BM ricevas "Esperanto" kaj la nacilingvan revueton.
- (2) Nur por Membroj-Abonantoj de UEA; ricevas la nacilingvan revueton.
- (3) Nur por personoj ĝis inkl. 25-jaraj; ricevas "Esperanto", "Koncize" kaj la nacilingvan revueton.
- (4) Nur por Junulaj Membroj-Abonantoj de UEA/TEJO; ricevas "Koncize" kaj la nacilingvan revueton.
- (5) Nur por personoj ĝis inkl. 15-jaraj; ne ricevas revuojn.
- (6) MA kaj MS ricevas "Esperanto", la jarlibron kaj membrokarton.
- (7) DM ricevas "Esperanto", la jarlibron kaj karton dum la tuta vivo.
- (8) Nur por personoj ĝis inkl. 21-jaraj; ricevas "Esperanto", "Kontakto", la jarlibron kaj membrokarton.
- (9) Nur por personoj ĝis inkl. 21-jaraj; ricevas jarlibron kaj membrokarton.

Petu pluajn klarigojn al la kasisto de via grupo !

aktualajoj

PUBLIKA LETERO AL LA EŬROPA ESPERANTISTARO :
 ESPERANTO EN LA LERNEJOJN !

Tiun sloganon ni jam aŭdas dum pluraj jardekoj, ĝi estiĝis ne pli ol slogano. Ĉu ĉiuj esperantistoj vere deziras la enkondukon de Esperanto en la lernejojn ? Ĉu ili ekzemple estas pretaj elspezimoni por ebligi tiun enkondukon ? Ŝajne ne ! Ŝajne ili ne komprenas ke agado necesas por atingi tion ! Dum pluraj jaroj la Eŭropa Esperanto Centro (EEC) agis kune kun la Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj (ILEI) en la kadro de la Eŭropa Instruista Unuiĝo (EIU) kaj la Eŭropa Kulturcentro (EK) en Ĝenevo (ambaŭ neesperantistaj institucioj) por konvinki ilin pri la valoro kaj neceso de Esperanto.

La plej grava pozitiva rezulto de tiu agado estas, ke EK eldonas sian bultenon por Eŭropecitisma Edukado "Eŭropa Dokumentaro" ankaŭ en Esperanto (antaŭe nur en la angla kaj franca lingvoj). Ĝi pritraktas interesajn temojn pri la evoluo de Eŭropo kaj ĝiaj popoloj. Por garantii la eldonon, necesas 500 abonantoj je la 1-a de januaro 1975. HONTINDA FAKTO estas, ke je la 1-a de septembro estis nur 268 abonantoj en Eŭropo kaj dek ekster la kontinento. KIAL TIU ABONO ESTAS TIEL GRAVA? ILEI startos lingvajn eksperimentojn en lernejoj en pliaj regionoj de Eŭropo. EIU kaj EK multe multe povas helpi en tiu kampaĵo per subteno kaj subvencio. Ilia kunlaboro estas nepre neceso.

sega. SED ne jam ekzistas eĉ 500 geesperantistoj kiuj interesiĝas pri la instruado de Esperanto en Eŭropo. KIEL ni povos atendi ke la Eŭropaj instancoj interesiĝas pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn ? La nederlanda sekcio de ILEI sendis gravajn proponojn al la edukministro. La sekcioj de Belgio, Britujo, Danujo, Germanujo kaj Italujo agas samsece. Ĉiuj proponoj estos senvaloraj se EK malkonsilos la akcepton al la Konsilio de Edukministroj. La estraro de EK estas favora al Esperanto, ĝi tute bone komprenas la neceson de internacia lingvo. SED, ĝi povas agi nur se la esperantistoj deziras mem montri sian intereson kaj aktivecon pri la instruado de la lingvo.

Esperanto en la lernejojn ne plu estu nur slogano, ĝi fariĝu realeco. Vi elspezu 128 frankojn (9 svisaj frankoj) por abono ĉiujara de Eŭropa Dokumentaro. Ĝi aperas kvarfoje jare. Tiel VI aktive helpas al la enkonduko de Esperanto en la lernejojn. Sendu tuj poŝtkarton kiel mendon al EUROPA ESPERANTO CENTRO NL-1719 SCHOORL (Nederlando).

Ne mallaŭdu viajn manĝaĵojn
 kiam vi ne malsatas.

R. Tagore

Prof. Gaston Waringhien: „Ni kaj ĝi“. Eseo III. En la belliteratura serio de „Stafeto“ sub gvidado de Prof. D-ro Juan R. Perez en La Laguna de Tenerife (Kanariaj Insuloj) - 346 p. - 234 fr.

Tiu ĉi verko konsistas el 2 partoj, religia kaj arta. Leginte la libron kaj - je la momento de la recenzado - suprrigardante la notojn kiujn ni skribis, ni lasas fali manon kaj plumon. Komentarii kaj preparoli tian verkon, postulus novan verkon proksimume egale dikan. Ni esperas ke iam - ekzemple en la Biblia Revuo - aperos iom vasta preparolado de la unua parto fare de kompetentulo pri bibliaj studoj. Ĝia centra demando estas la jena: kiuj estas la bazoj de la dogmoj en la (precipe katolika) eklezio? Evidente tiuj bazoj estas tekstoj. Tiurilate estis, se mia memoro estas bona, la de la aŭtoro citita Loisy, kiu iam diris "Al haroj de tekstoj ili pendigis montoj da dogmoj." Tio en si mem jam estas riska entrepreno. Ja dogmoj dependas de interpretadoj de (malmultaj) tekstoj. Sed kio se la tekstoj mem montriĝas dubaj, ofte malfidindaj, ne aŭtentikaj? Estas precipe kritiko pri la tekstoj kiun faras Waringhien, cetere tre profunde, kiel vera sagaca kaj spertoriĉa tekstokritikisto - Kompreneble ankaŭ la aŭtoro interpretas. Tiuj interpretadoj estas je sia vico malfermendaj por diskuto. Eĉ mi devas diri ke liaj interpretadoj de la preĝo "Patro Nia" malplaĉas al mi ĉar ŝajnas al mi ke ili estas ne ĝustaj nek justaj. En la lasta ĉapitro de tiu unua parto, la aŭ-

toro komunikas kelkajn "Pensoj ĉ Hospitalo". Tie frapis nin precipe la jena diro - kiu postulas certe klarigon, kiu mankas: „Estas mizeroj antaŭ kiuj oni sentas sin feliĉa ne kredi je Dio.“ Kial ne unu, nur unu ekzemplo?

La dua malpli dika parto pritraktas la arton. Mi devas nepre insiste ĉe ĉiuj kiuj intencas viziti konstruaĵojn (egiptajn ekz.) aŭ muzeojn, ke ili unue legu la tiurilatajn paĝojn en tiu ĉi libro. Estas vizitantoj kiuj sentas iun ĝenon antaŭ la grekaj genuduloj. Ili legu la paĝojn 278 ĝis 280. Tamen mi pensas ke mi rajtas starigi la demandon ĉu la artisto konsciis pri tiel multe da kvalitoj, kaj da trajtoj, kaj da enhavo en sia artverko kiel W. malkovris en ĝi? Ĉiukaze oni multe pli bone komprenas, kaj do multe pli bone ĝuas la artaĵon post legado de la konsideroj de la aŭtoro. Aldonu al tio, ke la libro entenas veran trezoron da historiaj informoj.

En la lasta ĉapitro "Kien la arto" G.W. klopodas komprenebligi tiujn modernajn ekstravagancaĵojn antaŭ kiuj multaj homoj skuas la kapon aŭ eĉ indigniĝas. Ĝi estas nepre leginda. Tamen je la fino de tiu ĉapitro oni troviĝas antaŭ dilemo: aŭ ĉiu estas artisto aŭ ne ĉiu estas artisto. En la lasta kazo: kiamaniere distingi la artiston de la ĉarlata-no?

Lasta konsidero: G.W. iĝis iom fama pro liaj neologismoj. Kiam la leganto rekontas tian vorton, li bone pripensu ĉu la malnova -

preskaŭ ĉiam kunmetita - termino donas la ĝustan, precizan, nepridubeblan signifon kiun ĝi devas havi en verko kiu estas scienca. Kaj preskaŭ ĉiam oni devos koncedi, ke tie efektive necesis nova vorto. La aŭtoro ne faris ion senpripense, eĉ ĉe ĉiu vorto kiun li uzas. Frapis min ekzemple ke li skribas „pasintaĵo“ anstataŭ la kutima „pasinteco“. Tute prave, ĉar „eco“ estas uzenda nur por abstraktaj konceptoj.

Legante G.W. mi ofte faris al mi la demandon: ĉu W. estas filologo? aŭ literaturisto? aŭ filozofo? Mi kredas ke li estas iom de ĉio tio; li estas kulturfilozofo. Fine mi nepre atentigu, ke tiu ĉi verko estas ankaŭ literatura verko pro ĝia tre bri-la stilo.

ψ

Peter de Smedt: „Nederlanda Bibliografio“ (1902-1972), 240 p. - 150 fr.

Kiam oni troviĝas antaŭ verko kiu postulis tre longdaŭran kaj paciencigan laboregon, oni nomas ĝin benidiktana laboro, ĉar nur tiuj monaĥoj havis la tempon kaj paciencan por plenumi ĝin. Nu tian laboron faris ankaŭ nia amiko P. de Smedt. Samtempe li donis ekzemplon. Efektive, en la evolu-proceso de nia Esperanto-kulturo estas necese ke ni disponu pri kompendioj pri ĉiuj tradukitaĵoj el la diversaj literaturoj. Nia nederlanda estas la unua. Ĝi do mencias ĉiujn romanojn, poemojn, novelojn, eĉ nur pecojn kiuj iam estis en Esperanton tradukitaj, kun citado de aŭtoro, tradukinto, revuo en kiu ĝi aperis ktp. Kaj oni miras, ke jam tiel multe a-

peris de nia literaturo en Esperanto. Prave la eminenta aŭtoro William Auld atentigas pri la eksterordinara graveco de jena verko. Gratulon kaj koran dankon al nia senlaca amiko. Espereble el la BEF-anoj multaj volos posedi la verkon, kiu estas ankaŭ vere propaganda allogaĵo.

ψ

Marinko Ĝivoje: „Interesa Arkeologio“. 60 paĝoj + 4 eksterpaĝaj bildotabuloj. Eld. SAT, Parizo; Prezo: 98 fr.

Tiu bele eldonita facila poŝformata libreto prezentas en alloga maniero la interesan sciencon de la arkeologio. Kiel ilustraĵo ĝi donas tre interesajn sciigojn pri la Vikingoj, pri Pompejo, pri la mondfamaj arkeologoj Winckelmann kaj Schliemann, pri submara vivo kaj esplorado ktp. Facila, bona stilo estas alia allogaĵo de tiu libro al kiu ni deziras sukceson merititan.

La ĉi-suprajn recenzojn verkis F. Roose, Bruĝo.

Guareschi en Esperanto

Ĝus aperis la Literatura Suplemento de „Heroldo de Esperanto“, la duonmonata grandformata sendependa Esperanto-gazeto, kiu aperadas jam de 1920.

La suplemento enhavas tradukojn el la araba, hebrea, hispana, itala, nederlanda, rusa kaj ukraina literaturoj, krom originalaj prozaĵoj kaj poemoj. Aparte interesa estas fragmento el la romano de Guareschi "Don Kamilo", unuafoje tradukita en Esperanton.

Por ĉiuj viaj asekuroj kaj reasekuroj

unu adreso :

J. VERDYCK & Co P.V.B.A.

ANTWERPEN, Lange Nieuwstr. 30

Telef. 03/320902 - Telekso 32283 - Telegr. "Dyckassur"

Agentejo en Nederlando:

ROTTERDAM, Korte Hoogstraat 9

Telefono 1142 19 - Telekso 23243 - Telegr. "Pemwem"

Reprezentita en Londono kaj ĉe "Lloyd's of London".

Korespondantoj en la tuta mondo

Unuaklasa servo

Kompetentaj fakuloj

KORESPONDO EN ESPERANTO

FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN

P. V. B. A.

St.-Bernardse steenweg 631
Hoboken

Vitraloj - Speguloj -
„securit“ vitro
kolorigitaj vitroj
aluminiaj senmastikaj
stangoj por kupoloj

Vitro-cementoj por
tutvitra-konstruaĵoj
mastiko

Telefono 272875